
DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (965) • 2024 •

## Internacia preĝotago 2024



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 philippe.cousson@sfr.fr

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Kungsgatan 13B; SE-281 54 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. 💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| De la arbo de Jesuo ĝis la kruco | 27 |
| Dek helpoj — pri la Dekalogo | 30 |
| Biblia vorto kun persona medito | 34 |
| Kristana seminario en Madagaskaro | 35 |
| Internacia monda preĝotago | 38 |
| La katedralo de Vác | 42 |
| Trinkakvo | 44 |
| Informetoj | 47 |
| Kanto: Dio, mi pekis | 48 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, jen nova numero de Dia Regno. Kiel ĉiam, 24 paĝoj kun interesa legado. Ĉi-foje inter alie kun tri tre diversaj raportoj. Unue pri kristana esperanta seminario en Madagaskaro, due pri reta internacia preĝotago kaj trie pri projekto por provizi puran trinkakvon.

Leginte tiujn tri artikolojn, fortiĝis mia sento, ke, kvankam ni loĝas kaj vivas malproksime kaj diversmaniere, ni tamen estas unu granda familio.

Alia temo, kiu trasorbigas plurajn artikolojn ĉi-fojajn, estas la temo *Paco.* Ĉiam aktuala temo, pli precize pri la manko de paco. Ni certe tuj pensas pri militaj konfliktoj nun okazantaj, sed paco ankaŭ povas rilati al mia persona kaj interna paco. La biblia vorto, kiun J. Veit pritraktas, tuŝas tiun gravan temon.

Ni preĝu per la vortoj de Jelly Koopmans-Schotanus (10 aprilo).

*Sinjoro Jesuo, benu la infanojn kaj la gejunulojn de la tuta mondo. Ili vivu en libereco kaj paco. Donu, ke ili povu ludi en ĝojo, ĉirkaŭataj de amo.*

# De la arbo de Jesuo ĝis la kruco


Laŭ artikolo de Zsófia Imrik, hungara pentristino, restaŭristino

Redaktis kaj tradukis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

*La ĉielo naskis la teron /*
*La tero naskis arbon /*
*La arbo naskis sian branĉon /*
*La branĉo naskis sian burĝonon /*
*La burĝono naskis sian floron /*
*La floro naskis Sanktan Annan /*
*Sankta Anna naskis Maria /*
*Maria naskis nian Sinjoron Kriston, /*
*La savanton de la mondo*

(arkaika popolpreĝo de hungara vilaĝo Búcsúszentlászló)

La bilda reprezentado de la genealogia arbo de Jesuo el la domo de reĝo David komenciĝis disvastiĝi dum la 12a jarcento. La kano kreskanta de la dormanta Jesse floras en grandegan genealogian arbon, sur kies branĉoj videblas la figuroj de la reĝoj, kiuj devenis de David. Sur la ĉizita arbo de Jesuo, reliefo de la baziliko Saint-Quentin en Francio (bildo 1), la ĉefa branĉo estas kronita de la krucumita Kristo.



Bildo 1: en baziliko Saint-Quentin en Francio (detalo)

Tamen, Kristo ne estas ĉiam prezentita ĉe la pinto de la arbo, kiel estas la kazo kun la ĉizita Jesuo-arba reliefo de la Iglesia Santa María del Castillo-preĝejo en Olivenza, Hispanio (bildo 2), kie la figuro de la virino vestita en la suno aperas kun la bebo Jesuo en ŝiaj brakoj.

Sur la murpentraĵo en la Katedralo de Sankta Johano en Toruń, Pollando (bildo 3 kaj bildo 4), la arbo radikiĝas en Jesse, sed ĝi ne plu prezentas reĝajn posteulojn. Dum Jesse kuŝas je la nivelo de la tera



Bildo 2: Iglesia Santa María del Castillo, Hispanio



Bildo 3: Katedralo de Sankta Johano en Toruń

mizero de la pekulo, memorigante nin pri la legendo de la morto de Adamo, la supro de la krucarbo finiĝanta en la mandorlo kun la resurektita Kristo jam kondukas la okulon en la anĝelan regnon. Jen kiel la genealogia arbo estas transformita en la arbon de vivo.

La ligna panelbildo (bildo 5) de Pacido di Bonaguida (1305-1310) ankaŭ estas vivarbo, sen prezenti la figuron de Jesse. La arbo estas fiksiĝinta en la Edena Ĝardeno, kie la kreado, falo kaj elpelo de Adamo kaj Eva povas esti vidata. Ĝiaj dek du branĉoj portas la fruktojn de la dono de savo, de ĝi pendas epizodoj de la vivo, sufero kaj gloro de Jesuo. Ĉe la supro de la kruco estas la simbolo de Kristo, pelikano nutranta siajn idojn per sia propra sango, kaj super ĝi estas la ĉiela juĝseĝo kun la surtronigitaj Kristo kaj Maria.


En la 14a jarcenta fresko Alegorio de la Kruco de Taddeo Gaddi (bildo 6), profetaĵoj ŝosas kiel branĉoj de la krucarbo staranta sur Golgoto. La rubandoj plenigitaj kun profetaĵoj finiĝas en la emblemoj de la profetoj. Ĝi ornamas la Preĝejon de la Sankta Kruco en Florenco.

Ekzistas ankaŭ genealogia arbo-reprezentantaro, kie la krucumita korpo de Jesuo pendas sur la arbo de Jesse. Bona ekzemplo de tio estas la arbo de Jesuo de la Krucumado-Kapelo de la Katedralo de Montrealo en Italio (bildo 7), kiu, kiel la antaŭaj bildigoj, disbranĉiĝas de la reĝaj prapatroj, kaj ĝia supra branĉo estas Maria.


Fotoj el Wikimedia commons, CC 3.0



Bildo 4: Katedralo de Sankta Johano en Toruń



Bildo 6: Alegorio de la Kruco de Taddeo Gaddi



Bildo 5: Pacido di Bonaguida (1305-1310)



Bildo 7: Katedralo de Montrealo en Italio

# Dek helpoj — pri la Dekalogo

## Naŭa ordono —
## Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston
## (Eliro 20,16)

József Farkas, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj, tradukitaj de Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

La vero de la naŭa ordono povas esti esprimata en tri rondoj de penso. En sia originala kaj strikta signifo, ĝi aplikis kaj aplikas al atesto antaŭ la tribunalo: Ne donu malveran ateston kontraŭ via proksimulo dum jura proceso, antaŭ la tribunalo.

Sed oni kutimas etendigi al pli larĝa rondo, kaj tiam ĝi jam signifas: Ne kalumniu vian proksimulon, sendepende ĉu vi staras antaŭ la tribunalo aŭ parolas sur la strato. Atentu pri via lango! Vi povas ekbruligi grandajn fajrojn per via lango. En la letero de la apostolo Jakobo, ni legas gravajn frazojn pri kiom senbrida kaj malbona estas la lango. En la Malnova Testamento ni legas: "La vipuro havas venenon sub la lango". Kaj ni povas eĉ pli vastigi la signifon de la ordono: Gardu vin kontraŭ mensogo!

Nun mi traktos la mezan rondon. Ĉi tiu inkluzivas ankaŭ la unuan rondon, se vi hazarde estas alvokita al tribunalo, kaj vi devas atesti tie, kaj kroĉiĝu al la vero ankaŭ tie. Sed la ordono de Dio validas por nia tuta vivo, do estu singarda en ĉiuj viaj homaj rilatoj: ne kalumniu vian proksimulon, ne tretu lian honoron!

Ne necesas malŝpari multajn vortojn por pruvi kiom multe homoj ŝatas klaĉi, akuzi kaj kalumnii. Ni observu, ke kiam temas pri la virtoj de iu en societo, ĝi estas enuiga temo. Tuj kiam liaj krimoj estas rivelitaj, aferoj tuj iĝas ekscitaj. Kaj la homoj tuj parolas, oni ne kontrolas la malbonan informon, oni volonte transdonas ĝin. Estas io ekscita kaj interesa en ĉi tio, mi povas diri malbonaĵojn pri la alia! Estas homoj ege sentemaj al tio, kion aliaj diras pri ili. Ili tuj saltas, koleras, batas, se oni diras ion ajn malbonan pri ili. Kaj ĉi tiuj samaj homoj estas tute liberaj paroli malbone pri aliaj. Kiel sentema homo estas al sia propra honoro kaj kiom indiferenta li estas kiam temas pri aliaj.

Kio estas ĉe la fundo de tiu ĉi universala homa fenomeno? De kie venas tiu ĉi konduto? Mi funde pensis pri la temo, kaj fine mi densigis la diagnozon de tiu ĉi fenomeno en unu kompleksan esprimon: prestiĝa frenezo. El prestiĝa frenezo naskiĝas kalumniaj paroladoj. Kio estas prestiĝo? Ni povus ankaŭ diri: memkulto, MI-kulto, modo de mempligrandigo. Pli-malpli ĉiuj homoj havas

ĉi tiun mizeron: memamego, memkulto: mi estas la centro de la mondo. Ĉiuj volas elstari el la homamaso, volas esti la unua, regi super la aliaj. Mi nomas ĉi tiun deziron, ĉi tiun instinktan prestiĝon frenezo, ĉar la proporcioj de tiu ĉi instinkto ne estas sanaj.

Mi akceptas kaj konfesas, ke Dio donis al la homo la deziron fariĝi granda. Ne estas malbone, se iu volas esti bonega, se iu volas elstari. Ĉi tiu instinkto ne estas malbona en si mem. Dio kreis la homon tiel, ĉar Li kreis lin por kresko kaj grandeco. La problemo estas kiam okazas prestiĝfrenezo. Ĝi funkcias tiel: "Mi volas esti granda, sed estas la alia persono, kiu ne lasas min esti granda, ĉar eble li estas pli granda ol mi. Li estas mia kontraŭulo, mia rivalo. Kion fari?" La fruktodona solvo estas, se mi volas superi lin, per honesta laboro. Ĉi tio antaŭen irigus la homan socion. Sed kutime oni elektas pli malmultekostan solvon. Se mi ne povas esti pli granda ol vi, tiam mi almenaŭ ĵetos al vi koton, tiam tamen mi estos pli granda! Homoj povas vidi ke vi estas ŝlima. Jen la hontinda afero pri kalumnio.

Kaj ĝi povas havi mil diversajn variaĵojn, tre fajnajn vibrojn. Kristano vere ekzercu sin por rekoni la malhonorigon de sia propra koro. Mi donas al vi ekzemplon: se viro rimarkas, ke al lia edzino plaĉas alia viro, tiam la edzo tuj komencas fari komentojn: tiu viro estas tia kaj tia. Kompreneble same faras la edzinoj: se virino rimarkas, ke ŝia edzo ŝatas alian virinon: ŝi estas tute stulta, tia kaj tia. Ĉi tiu matĉo okazas: kotŝmiri la alian, por ke tiamaniere mi estu bona kaj granda.

Ĉi tio okazas kaj individue kaj kolektive: grupa spirito, kompania spirito. Ni ne toleras, ke nia grupo estu pli malgranda ol la alia. Bedaŭrinde, ĉi tio validas ankaŭ por eklezioj. Ne la vero gravas, ne Kristo gravas.

*Kiel sentema homo estas al sia propra honoro kaj kiom indiferenta li estas kiam temas pri aliaj.*

Prestiĝa frenezo jam kaŭzis nemezureblajn suferojn en tiu ĉi mondo. La unua mondmilito eksplodis – almenaŭ rekte – pro prestiĝo. Ni ne toleras la insulton, kiu trafis nin! Ni tuj devas ekirigi la armeajn teamojn. Estis ankaŭ aliaj kialoj, mi scias. Laŭ mi, Hitler pro prestiĝa frenezo ne povis fini la duan mondmiliton, kiam la germanoj perdis jam ĝin antaŭ longe. Kaj mi tre timas, ke prestiĝo ludos teruran rolon en la eksplodo de la tria mondmilito. La plej multaj konfliktoj en la mondo radikas en tiu ĉi frenezo, ke mi estas granda, mi estas la unua, mi ne permesas, ke mia gloro estu obskurita. Ĉi tio validas por stultaj, ĵaluzaj viroj kaj virinoj same multe kiel por la grandaj mondpotencoj.

Jen pri kio temas tiu ĉi ordono: “Ne atestu malveron kontraŭ via proksimulo!” Ne volu pliigi vian propran gloron tiel, ke vi kotŝmiras la gloron de la alia homo, ke vi detruas lian honoron! Povu rilati tiel, ke vi suferas prestiĝan malvenkon! Mondpaco baldaŭ povus esti establita, se la grandaj potencoj volus preni tiun ĉi riskon. Ĉu la mondpaco ne valorus ĝin? Sed kiu povas fari tion? Jen ni estas en la koro de tiu ĉi ordono. Mi pensas, ke parto de la batalo de kredo de kristano kuŝas en lia lukto kontraŭ prestiĝa frenezo. La kristana homo entreprenas tiun ĉi nepopularan taskon. Ĉu estas ankaŭ ĉi tie homoj, kiuj donos la ĝustan alternativan penson? Ĉu estas kuraĝuloj en nia eklezio, kiuj kuraĝas paroli kontraŭ la eklezia prestiĝa frenezo? Ni parolas pri renovigo, pri venka marŝo, ĉar la prestiĝo de la eklezio postulas, ke ni staru antaŭ homoj kiel gajnantoj. Kiu permesas justecon venki, tiu obeas la naŭan ordonon. Ni finu mensogi pro prestiĝaj kialoj, kalumnii la alian, altigi nin mem. Ni mortos, ni pereos en ĉi tio!

La vero estas, ke ni mensogas ne nur unu al la alia, sed ankaŭ al ni mem. Tiuj, kiuj ne atingis la punkton esti honestaj kun si mem, ne levu sian vorton al aliaj. Tiuj, kiuj lernis esti honestaj kun si mem, kapablas doni sian ateston trankvile kaj serioze ankaŭ al la ekstera mondo.

Nia interna mondo povas esti komparata kun granda parlamento, kie okazas intertraktadoj kaj debatoj. Tiu homo havas sanan internan mondon, kiu vere vivas en parlamento, kie estas debatoj kaj opozicio. La interna vivo de homo, kiu estas plena de streĉitecoj, estas sana. Sed estas malfacile vivi en streĉo, disputi kun si mem, kondamni sin. Tial, kiel psikologoj ĝisfunde esploris, la homo ne ŝatas ĉi tiun streĉiĝon kaj evoluigis labormetodojn por silentigi ĉi tiun parlamentan debaton. Iu tre sprite vestis ĉi tiun ideon en la sekva bildo: “Nekonatulo, kies brakhorloĝo estas tute preciza, alvenas en urbon. Kiam li alvenas, li rigardas supren al la turhorloĝoj kaj vidas ke ili ĉiuj estas duonhoro antaŭe. Homoj adaptis siajn proprajn horloĝojn al la turhorloĝoj. La tuta urbo vivas en malĝusta sistemo kaj tiam la nekonatulo provas diri: Homoj, mia horloĝo estas preciza, jen la vero! Sed la aliaj mokas lin, batas lin je la kapo, vundas lin. En la fino, la nekonatulo komencas pensadi. Eblas, ke mia horloĝo estas malbona, eble ili pravas. Kaj finfine, li alĝustigas sian horloĝon al la turhorloĝoj.”

> *Tiuj, kiuj ne atingis la punkton esti honestaj kun si mem, ne levu sian vorton al aliaj.*

La homamaso ne pravas! Tio ĉi malofte estis la kazo. Profetaj animoj, elektitaj, honestaj serĉantoj de vero pravis. Jesuo Kristo pravis kontraŭ la homamaso. Sed estas potenco en la homamaso, kaj Jesuo aŭ akceptis la

krucon aŭ konformis al la homamaso. La unua afero, kiun li batalis, estis, ke mi ne alĝustigas mian horloĝon al la turhorloĝoj, se mi certas, ke mia horloĝo estas ĝusta. Ĉi tio postulas tre kompleksan sistemon de konduto. Ne necesas esti perforta, mi ne povas ŝanĝi la mondon, sed mi povas fari tion, ke mi ne alĝustigas mian horloĝon al la turhorloĝoj, se ili misfunkcias. Kiu malkuraĝe submetiĝas al la gusto, deziro kaj pasio de la homamaso, tiu sin trompas. Kaj kiu ne batalas ĉi tiun batalon, ke li staras firme en siaj propraj aferoj eĉ se estas malsukcesoj, ne povos plenumi grandajn servojn en la regno de Dio.

Serĉi la veron interne ne signifas, ke nepre mi pravas. Sed signifas, ke Dio pravas, kiu nomas min pekulo, kiu ankaŭ malkaŝis min. Mi portas la veron de Dio, ne mian ver-fanatismon. Ĉi tio estas la interna parto de tiu ĉi ordono. Ne mensogu al vi mem! Ne diru, ke vi estas morale senriproĉa, kiam via koro brulas de malpuraj deziroj. Almenaŭ estu honesta. Dio pravas, mi estas mizera homo. Ni devas trejni nin en tiu ĉi honesteco, kaj tiam ni povas batali kontraŭ la frenezo de prestiĝo.

Nun ni rigardu la aferon el la vidpunkto de Jesuo Kristo. En la 26-a ĉapitro de la Evangelio laŭ Mateo, kie temas pri la konduko de Jesuo antaŭ tribunalon, ni legas: “Kaj la ĉefpastroj kaj la tuta sinedrio serĉis malveran ateston kontraŭ Jesuo, por ke ili povu lin mortigi; kaj ne trovis, kvankam multaj malveraj atestantoj venis. Sed poste venis du, kaj diris: Ĉi tiu diris: Mi povas detrui la sanktejon de Dio, kaj rekonstrui ĝin en la daŭro de tri tagoj...” (59-61). Jesuo povis sperti tion: li estis kondamnita al morto surbaze de malvera atesto.

“Ne atestu malveron kontraŭ via proksimulo” – la vipo de tiu ĉi peko klakas sur la dorson de Jesuo Kristo, tiom ke li estis kondamnita al morto surbaze de falsa atesto. Ni povas eltiri du konkludojn el tio.

La unua konkludo estas jena: tiel vi pensadu pri kalumnio, pri falsa atesto, ke vi batas la dorson de Jesuo Kristo per via vipo, kiam vi faras malveran ateston. Se vi batas min, tio ne estas grava, ne estas danĝera, sed Jesuo sin identigas kun mi, kiam vi malveron atestas kontraŭ mi. Ĉar Jesuo spertis, ke tiu, kiu volis helpi la tutan mondon, kiu volis konstrui grandan templon por Dio, estis akuzita, ke li volas detrui la sanktejon. Jesuo tre bone komprenas tiujn kaj staras solidare kun tiuj, kontraŭ kiuj ili faras malveran ateston.

La dua konkludo estas jena: se ili donas malveran ateston pri ni, ni ne faru grandan aferon el tio. Vi ne rajtas treti la honoron de alia persono. Vi devas haltigi la falsan inundon, dirante al la alia homo: “Se vi havas datumojn, venu kaj ni klarigu ĝin. Sed se vi nur aŭdis ion, vi ne scias, vi ne certas, tiam vi ne parolu!”

Kristano ne tretu la honoron de alia persono, sed ne estu por li tiel tragike, se lia honoro estas tretita. Diru, ke mi estas en bona akompano, same ili faris kontraŭ la profetoj. Unu el la grandaj konsoloj de mia vivo estis tiu ĉi bela ĉina proverbo naskiĝinta antaŭ miloj da jaroj: “Ŝtonoj estas ĵetitaj nur kontraŭ tiu arbo, kiu donas dolĉan frukton”. Tio estas klara.

Ne indas ĵeti ŝtonojn al senfrukta arbo. Ili ankaŭ kalumniis Jesuon Kriston, la profetojn kaj la apostolojn. Oni devas gaje akcepti tion. Ŝajnas, ke la arbo de mia vivo donas dolĉajn fruktojn, pro tio oni ĵetas sur min ŝtonojn.

Jen la dialektika sinteno de kristana homo el la vidpunkto de Jesuo Kristo. Unuflanke, la honoro, vivo, intimeco kaj aferoj de alia persono estas sanktaj, kaj oni ne rajtas treti ilin. Aliflanke, se iu piedpremas mian honoron, ĝi ne devus esti konsiderata tiel tragike. Ni staras antaŭ la juĝseĝo de Dio, ne de homoj.

Estas mirinda verso en 109a Psalmo. Se iu fartas malbone pri kalumnio, mi rekomendas, ke tiu konsolu sin mem per la 28a verso de tiu ĉi psalmo: "Ili malbenas, sed Vi benu".

La honoro de la alia persono estas sankta, sed la vera ĝojo de la kristana homo ne estas sia propra honoro. Kiam iu kalumnias vin, vi nur diru: "Kiom pli mi povus aldoni al tio, kion vi diras pri mi!" Por kristana homo la plej granda valoro estas la graco de Dio. La fakto, ke Dio akceptis min, pekan homon en sian gracon, donas al mi, pekulo benon.

*Ili malbenu min, nur Vi, Sinjoro, benu min, por ke mi ne perdu Vian gracon!*

Ni trejnu nin en tiu ĉi pensmaniero, tiel ni plenumu la naŭan ordonon en la spirito de Jesuo Kristo!

ଔ

## Biblia vorto kaj mia penso

Karaj, ofte en la normala vivo ni devas fari elekton inter du (aŭ pli) da bagatelaj alternativoj: ĉu tagmanĝi en restoracio A aŭ en restoracio B; ĉu vojaĝi al sia laborloko per la buso, la metroo aŭ la biciklo; ĉu iri kun iu amik(in)o al koncerto aŭ al la kinejo, ktp. Paŭlo prezentas al ni iom pli gravan elekton: ĉu fidi al la riĉo kaj la materialaj benoj, aŭ ĉu fidi al la vivanta Dio? La riĉeco ĉirkaŭe estas foje tre okulfrapa, kaj estas pli facile elekti ĝin en societo, kie la akiro kaj posedo de materialaĵoj estas alte taksitaj kiel signo de sukceso. Tamen Dio, kvankam nevidebla, estas tiu, kiu donas al ni ĉion, por ke ni havu la "efektivan" (realan) vivon.

***Jerald Veit***

* * *

1. Timoteo 6,17–19

*Admonu tiujn, kiuj estas riĉaj en la nuna mondo, ke ili ne estu arogantaj, kaj ke ili apogu sian esperon ne sur la malcertecon de la riĉo, sed sur Dion, kiu donas al ni riĉe ĉion por ĝuado; ke ili bone agadu, ke ili estu riĉaj je bonaj faroj, ke ili estu pretaj disdoni, simpatiemaj; provizante por si bonan fundamenton kontraŭ la venonta tempo, por ke ili ektenu la efektivan vivon.*

# Kristana seminario en Madagaskaro

Raportas Miora RAVELOHARISON, MG

La Kristana Seminario-Esperanto okazis de ĵaŭdo la 7a ĝis sabato la 9a de marto 2024 en la gastigejo de la MAMRE FJKM en Sabotsy Namehana. MAMRE FJKM estas Asocio de la fratinaro el la reformisma protestanta eklezio FJKM.

Sabotsy Namehana situas je deko da kilometroj norde de Antananarivo. Nia ĉefa celo estas refunkciigi nian Kristanan Esperanto-agadon en Madagaskaro. Ni havas du asociojn: AME, la sekcio de KELI kaj MUKE, la sekcio de IKUE. AME estas Asocio de Malagasaj Evangelianoj kaj MUKE estas Malagasa Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj. Nia seminario fokusis al la temo "Vizioj por pli bona mondo". Partoprenis ĝin entute 43 kristanoj el kvar kluboj – la Esperanto-Klubo de Analamahitsy, la Verda Insulo de Esperanto (Anosibe), Itaosy Esperanto-Klubo, Sunleviĝo Moramanga – kaj Ulrich Matthias el Germanio. La partoprenantoj tranoktis kaj manĝis surloke.



Kunfoto post la malfermo de la seminario

## Nia programo

1- Kunpreĝadoj kaj prelegoj

Ni komencis nian seminarion per la ekumena meso gvidata de Pastorino Miora RAVELOHARISON. Kelkaj geesperantistoj partoprenis la preĝojn, legadon de la Biblio. La Diservo fokusis al la parolo de Jesuo "Pacon al vi" en Johano 20,19b. Tri mesaĝojn ni havis el tiu versiklo, unue, ne nur sufiĉas iri al preĝejo, ne nur sufiĉas preĝi, sed ni vere bezonas akcepti Jesuon eniri en nian koron. Due, kiam Jesuo estas en nia koro, ni ricevas Lian pacon. Trie, kiam Jesuo estas en nia koro, ni ricevas Lian ĝojon kaj feliĉon. Do, la alveno de Jesuo en nia vivo ŝanĝas nian mondon.

Por fermi nian seminarion, ni havis ekumenan meson gvidata de pastorino Miora RAVELOHARISON. Kelkaj geesperantistoj partoprenis la preĝojn, legadon de la Biblio. La Diservo fokusis al la parolo de Jesuo en Johano 13, 34–35. Du mesaĝoj el ĝi: Se ni volas ŝanĝi la mondon, ni devas obei la ordonon de Jesuo: ami unu la alian. Due, se ni vizias ŝanĝi la mondon, ni devas ami sen—

diskriminacie ĉie kaj ĉiam, por ke ĉiuj sciu ke ni estas disĉiploj de Jesuo. Kiam ni havas Jesuo-n en nia koro, ni Virinoj en la Kristana Seminario povas ami unu la alian kaj ni dividas ĝojon kaj pacon al homoj. Tiele, ni ŝanĝas nian mondon.

Ni havis komunan dankpreĝon ĉiumatene kaj ĉiuvespere, gvidataj de partoprenantoj.

La unuan tagon, nia kara amiko Ulrich Matthias prelegis pri "vizio por pli bona mondo". Li parolis la vortojn de Jesuo por havi amon kaj amikecon al malamiko kaj karitaton kun mizerikordo laŭ Marko 12,19, Mateo 5,43–44, Mateo 5,7. Li prezentis ankaŭ la vortojn de Zamenhof pri harmonia homaro, frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Poste, li prezentis la problemojn en Madagaskaro pri la granda malsato, ekologio, forhakado de arbaroj, korupto. Malgraŭ multaj problemoj, Madagaskaro havas pacon, liberecon kaj malfermecon al la mondo. Por fini sian prelegon, li proponis kelkajn ideojn por eskapi el malriĉeco: evolua kunlaboro, allogaj investoj, turistoj…

Ni preĝis kune la "Simplan Preĝon" atribuata al Sankta Francisko el Asizo.

La duan tagon, pastorino Miora Raveloharison instruis la temon "Tiuj kristanoj volas ŝanĝi la mondon, kiuj havas profundan rilaton kun Dio per preĝado". Dio parolas al homoj per Sia Vorto kaj homoj parolas al Dio per preĝo. Tio instruas pri tio, kio estas preĝo. Kiam ni preĝas? Kiel ni faros ĝin? Kiuj troviĝas en la preĝo? La gestoj preĝante? La sinteno preĝante?

## 2- Lernado de kantoj, plivigligado kaj lingvoinstruado per diversaj ludoj kaj ekskurso

La partoprenantoj kunlernis ok kristanajn kantojn, parte el Adoru kaj parte tradukitaj el la malagasa lingvo. Ulrich kaj Miora tradukis ilin kaj instruis al ĉiuj partoprenantoj.

Ni kune ĝojis kanti kaj kune danci por la Gloro de nia Dio. Ni plivigligis nian seminarion per ludoj en la salono kaj en la korto. Ni instruas Esperanton per tiuj diversaj ludoj.

Ni havis ekskurson en la dua tago. Ni vizitis la praulan kaj reĝan kultejon kaj palacon. Kelkaj homoj, vidinte nin kun la T-ĉemizo, demandis nin pri Esperanto. Eĉ kelkaj neesperantistaj turistoj el Ĉinio prenis foton kun ni por bona rememoro



Ili sekvis la prelegon de Ulrich Matthias

pri nia grupo. Ĉiuj partoprenantoj sentis, ke la etoso estis tre amuza kaj ĝoja, tre varma, amika kaj paca. Ĉiuj estas fieraj pro nia lingvo Esperanto.

Ĉar inter ni estis ankaŭ kelkaj komencantoj, ni uzis krom Esperanto ankaŭ la Malagasan.

### 3- Balotado

Nia celo de tiu Kristana Seminario estis refunkciigi nian Kristanan Esperanto-agadon en Madagaskaro. Tial ni havis tempon por la balotado de la estraranoj de AME kaj MUKE. La katolikaj esperantistoj akceptis tiujn novajn estraranojn de MUKE: honora membro estas Ranja Arc Lydie ZAFINIFOTSY, la prezidantino estas Haliarinoro RAVONIARIMANANA, la sekretariino nomiĝas Lahitriniaina Mampionona RANDRIANAVALONA kaj ĉiuj elektis Raymonde Victorine ANDRIAMASINORO kiel kasistinon.

La protestantoj kunvenis kaj elektis jenajn estraranojn de AME: honora membro estas pastorino Miora RAVELOHARISON, Nathan HERINIAINA prezidanto, Tatiana RAVOLOLOMAMPIONONA kasistino kaj Torine RAHARISOA sekretariino.

La organizantino provizis al tiuj, kiuj mendis ĝin, ilian respektivan T-ĉemizon. "Jesuo en mia koro" estis skribita en la antaŭa flanko kaj "Pacon al vi" (Joh 20,19b) sur la dorso de nia T-ĉemizo.

Ĉiuj partoprenantoj kunvivis amike kaj pace en tiu seminariejo. Ni ĉiuj volas ŝanĝi nian mondon sub la gvidado de nia Jesuo. Ĉiuj partoprenantoj pretas agi por bona mondo plena de paco. Danke al tiu evento, ni povis refunkciigi niajn kristanajn sekciojn, kiuj partoprenos en gravaj taskoj pri la movado de Esperanto en nia lando.

Post la oficiala fermo de nia seminario, ni ĝoje kunfotis nin. Ni planas havi tiun kristanan seminarion ĉiujare en Madagaskaro kaj deziras ricevi subtenon de vi, ekzemple pere de la germana sekcio de KELI, kiu grave subtenis nian ĉi-jaran aranĝon. Ni ĉiam pretas kunlabori kun vi, ne nur por la disvastigo de Esperanto sed ankaŭ por la kreskigo de nia kristana movado.

*Kaj mia Dio satigos ĉian*
*vian bezonon, laŭ Sia riĉo*
*en gloro en Kristo Jesuo*

Filipianoj 4,19



Membroj de AME



Nova estraro de KELI-sekcio en Madagaskaro, AME

*Mi petegas vin ... toleru unu la alian kun amo.*

Letero de Paŭlo al la Efesanoj 4,1-7

# Internacia monda preĝotago

## Interreta kuna preĝo en marto 2024

Raportas Bengt O Åradsson, SE

Monda Liturgio, preparita de la 'Palestina Monda Tago de Preĝo'-komitato

Ĵaŭde, la 7an de marto, estis denove organizita reta preĝokunveno pro la ĉiujara internacia preĝotago. Ankaŭ mi partoprenis la retan preĝon kaj el la ĉi-jara liturgia programo mi ĉerpas kelkajn tekstopartojn al tiu ĉi malgranda raporto.

Unu simbolo, kiu estis uzata tra la liturgio, estis la oliv-branĉeto, simbolo de paco, kiu estas eĉ pli aktuala temo ĉi-jare.

La kunan preĝon partoprenis ĉirkaŭ deko da personoj, el pluraj landoj, eĉ el diversaj kontinentoj. Gvidis la preĝon Ágnes Ráczkevy-Eötvös kun la helpo de pluraj kunpreĝantoj. La kantojn proponis kaj gvidis Albrecht Kronenberger.

Kiam oni partoprenas surloke en fizikaj preĝoj, oni havas la eblecon monsubteni proponitajn organizojn. Tio ne same funkcias en retaj kunvenoj, do ni proponas ke oni mem, laŭplaĉe, elektu iun helpan organizon kiu laboras ekz. por paco, virinaj subtenoj, infanprizorgo aŭ simile. En tiu ĉi revuo vi ankaŭ povas legi pri akvoprojekto kiu bezonas subtenon.

Saluton! Pacon al vi! Antaŭ tridek jaroj, la temo de la Internacia Tago de Preĝo en 1994, "Venu, Vidu kaj Agu", ankaŭ estis evoluigita de palestinaj virinoj. Ĉar Palestino estas la lando kie kristanismo komenciĝis, virina laborgrupo tie denove estis petita evoluigi la temon por la Monda Tago de Preĝo 2024.

Dum kvar jaroj, la ekumena laborgrupo preĝis kune kaj pripensis la temon de Efezanoj 4, 1-7: "*Mi petegas vin ... toleru unu la alian en amo*". Kaj nun ili petas ĉiujn ĉirkaŭ la mondo aliĝi al ili en preĝado kaj agado.



En la decida momento de sia vivo, Jesuo donis ĉi tiun ordonon al siaj disĉiploj: *Amu unu la alian. Tenu unu kun la alia en amo.*

Ĉe nia Diservo hodiaŭ, ni lernas la rakontojn de tri palestinaj kristanaj virinoj. Ĉiuj tri estas potencaj atestoj al la ordono de Jesuo porti unu la alian en amo.

### Ni aŭskultu la rakonton de Eleanor!

Mia nomo estas Eleanor. Mia haŭto estas sulkigita kiel trunko de olivarbo. Kiel la olivarboj, mi atestis multajn militojn kaj perfortojn. Mi estas palestina kristanino, membro de la Greka Ortodoksa Eklezio de la Sankta Lando [Patriarkeco de Jerusa-

lemo]. Mi venas de antikva Jerusalema familio. Mia praavo en la 19a jarcento konstruis la Ortodoksan preĝejon de sankta Georgo. La preĝejo funkciis ĝis 1948, kiam 750 000 palestinanoj estis devigitaj forlasi sian patrujon, disiĝis aŭ iĝis rifuĝintoj kiel rezulto de la katastrofo Jam an-Nakba[1]. Mia familio faris same. Pro la pafadoj kaj bombadoj, miaj gepatroj provis savi siajn vivojn. Ili restis ĉe kuzo de mia patrino kaj esperis baldaŭ reveni al sia hejmo kaj preĝejo. Tamen tiu momento ne venis.



Hodiaŭ israela kulturcentro, la Konfederacia Domo, funkcias en la konstruaĵo de iama loĝejo de miaj gepatroj kaj la preĝejo de Sankta Georgo.

Antaŭ ol miaj gepatroj fuĝis, iliaj judaj najbaroj proponis prizorgi la sanktajn objektojn de la preĝejo – la ikonojn kaj la altvalorajn komunumajn kalikojn. Ili promesis konservi la havaĵojn de miaj gepatroj ĝis la reveno de la familio.

Dum nia infanaĝo, niaj gepatroj ŝate referencis al la najbaroj kaj atendis la grandan tagon de ilia reveno. Ili imagis kiamaniere ili ricevos la favorojn kaj salutos la najbarojn pro la promeso plenumita. Bedaŭrinde, ili ne povis akiri ĉi tiun momenton. Sed la memoro estas vigla en mi, ke malgraŭ la doloro kaj sufero pro iliaj perdoj, ili ĉiam estis dankemaj kaj afable parolis pri siaj iamaj judaj najbaroj. Miaj gepatroj instruis min toleri aliulojn en amo kaj ĉiam esti dankema al miaj bonfarantoj.

Mi vivis mian vivon kiel palestina kristanino vivanta en Jerusalemo kaj decidis esti plene engaĝita al ĉiuj membroj de la komunumo kaj loke kaj tutmonde. La ekzemplo de miaj gepatroj instruis min, kiom gravas kunteni kun aliaj, eĉ dum malfacilaĵoj kaj malfacilaj cirkonstancoj.

Mia respondeco pri la komunumo vekiĝis en la sesa klaso. Mia araba instruistino petis min helpi pri sia humanitara laboro. Sub la influo de ŝia milda kaj afabla persono, mi komencis aprezi kaj ami agadojn, kiuj faciligas la vivon de aliaj homoj.

Poste, mi mem planis kaj efektivigis humanitaran helpon kaj disvolvajn programojn, sociajn kaj komunumajn projektojn. Ili servis ĉiujn sendepende de religio, etneco, sekso kaj socia aparteneco aŭ la speco de bezono. Mi konsideris kiel honoro povi helpi centojn da virinoj en Jerusalemo, Gaza-Zono kaj Cisjordanio (okcidenta flanko de rivero Jordano), gajni panon por ke ili povu vivteni siajn familiojn. Multaj projektoj bele kreskis kaj disvastiĝis kaj faciligis la vivon al multaj.

La vivo ne ĉiam estas facila. Mi ankaŭ alfrontas fiaskon, troviĝas obstakloj, eĉ minacoj. Sed mi firme kredas, ke nia komunumo povas esti forta, kiam estas vera amo, kompreno, mildeco, humileco kaj pacienco. Mi scias ekde infanaĝo, ke la vivo estas fragila kaj paco ne estas garantiita. Mi povintus forlasi la landon de miaj prapatroj, sed mi elektis resti ĉi

1) Nakba tago: palestina funebrotago. La palestinanoj spertas la 14an de majo 1948, kiam la ŝtato Israelo estis establita, kiel la perdo de sia patrujo. Jam an-Nakba: tago de katastrofo.

tie. Mi volas vivi laŭ la ordono de Jesuo, amante aliajn kiel Dio amas min.

*Ni pensu pri la laboro de Dio, kiel ĝi ebligas nin porti aliajn en amo!*

### Ni aŭskultu la rakonton de Lina!

Mia nomo estas Lina. Mi perdis mian onklinon la 11an de majo 2022.

Shirín'[2] estis bonkonata ĵurnalistino kaj estis mortigita en Jenin. Ŝi estis por mi kiel olivbranĉo: ŝi rezistis la fortan venton, kiu volas forviŝi la veron de la palestina vivosperto.

Kun la morto de mia onklino Sirín' perdiĝis legendo: la ikoneca kaj legenda ĵurnalistino el Al Jazeera. Sed Sirín' estis pli ol tio.

Mia onklino, mia baptopatrino kaj mia plej bona amikino. Mi ĉiam rigardis ŝin kiel mian rolmodelon, same kiel multaj aliaj junaj palestinaj virinoj. Kreskante, mi deziris esti same sukcesa, edukita kaj kompatema kiel ŝi. Mia memoro konservas niajn komunajn spertojn: konversacioj pri arto, politiko kaj vivtemoj; televidprogramoj, ferioj kaj familia tempo.

Dum dudek-kvin jaroj, mia onklino Sirín' sindone transdonis la historion de la eventoj travivitaj de la palestinanoj; ŝi estis rekomendantino de ilia vero.

Tra la televida ekrano ĝi atingis ĉiun hejmon en Palestino kaj la araba mondo. Surbaze de la atesto de ŝia entombigo, ŝi ankaŭ kortuŝis la korojn de la palestinanoj. La solidareco ĉe la entombigo restas eterna memoro en mi kaj en la kolektiva memoro de la palestina popolo. Ni estas eterne dankemaj al la fortaj kaj kuraĝaj palestinanoj, kiuj portis la ĉerkon de Sirin' sur siaj ŝultroj, spitante la minacojn de la israelaj fortoj.

Multaj homoj ne sciis, ke mia onklino estas palestina kristano. Surbaze de sia kredo, ŝi toleris ĉiujn kun amo, sendepende de religia tradicio. Ŝi defendis tiujn, kiuj estis vunditaj. Ŝi batalis, por ke kaj islamanoj kaj kristanoj povu eniri siajn sanktajn lokojn en Jerusalemo. Ŝia verado ankaŭ estis formo de ame toleri la okupantojn. Nomi la veron estas formo de ama rezisto, ĉar ĝi restarigas la premanton al lia homaro. Kvankam Sirín', la olivbranĉo, estis tranĉita tro frue, ŝia heredaĵo vivas. Ŝia memoro nun nutras la landon, el kiu ni ĉerpas forton por diri la veron kaj postuli justecon.

*Ni aŭdis la historion de ĉi tiu virino, kiu kuraĝis paroli la veron en amo. Ni prenu ŝian vojon!*

### Ni aŭskultu la rakonton de Sarah!

Mia nomo estas Sarah. Kelkfoje mi sentas, ke mi estas folio de olivarbo, kiu ricevas sian vivigan potencon el la profundo de la radikoj.

Mi naskiĝis kaj kreskis en Jerusalemo kiel evangelia kristano. Kiel palestina virino, mia vivo neniam estis facila. Mi ĝojas, ke mia eklezio ankaŭ kontribuis al sociaj ŝanĝoj per ordinado de la unua ina pastoro. Mi vidis kaj admiris la persiston de la palestinanoj dum jaroj. La historio de mia familio, kiel tiu de multaj familioj, estas nedisigebla de tio, kio okazis en Palestino. La sekva rakonto montras, kion signifas esti palestinano en nia lando.

2) Shirín' Abu Akleh (1971-2022) estis palestin-usona ĵurnalistino kiu laboris por Al Jazeera TV. Ŝi estis mortpafita raportante la israelan atakon kontraŭ la palestina rifuĝejo en Jenin (Cisjordanio) la 11an de majo 2022.


Miaj geavoj loĝis en Jafo. Ili kreskis tie antaŭ 1948, kune kun aliaj kristanoj, islamanoj kaj judoj. La starigo de la ŝtato Israelo en 1948 estis katastrofo por la palestinanoj, kiuj vivis tie dum miloj da jaroj. Ni nomas ĉi tiun katastrofon la Nakba. Israelaj soldatoj invadis la domon de miaj geavoj kaj devigis ilin forlasi sian hejmon. Tiel ili fariĝis rifuĝintoj en Jordanio.



Jarojn poste, miaj geavoj venis viziti Jerusalemon. Poste la tuta familio iris al Jafo. Ili tre deziris montri al ni sian malnovan hejmon. Avo rakontis al mi pri sia infanaĝo, kiel li kaj lia patro plantis arbojn. Tiuj arboj efektive helpis nin trovi la domon! Ĉio multe ŝanĝiĝis, krom la arboj. Ili helpis nin identigi la lokon. Bedaŭrinde la tie loĝantaj homoj akceptis nin malamike. Mi estis ankoraŭ infano, sed mi memoras, ke oni kriis kaj forpelis nin. Eĉ ne ŝajnis, ke ni volas eniri la domon, ni nur rigardis ĝin de ekstere. Mia avo provis diri al ili, ke tiu estas nia malnova domo. Sed ili ne interesiĝis pri la klarigo. Ni estis forpelataj. Tio certe estis aparte dolora por mia avo, kiu estis forpelita el sia propra domo por la dua fojo.

Poste, kiam mi vizitis miajn geavojn en Jordanio, mia avino montris al mi la apartamento-ŝlosilon, kiun ŝia patrino kunportis kiam ili estis forpelitaj. Ŝi konservis la ŝlosilon, se ili povus reveni hejmen iam. Bedaŭrinde, multaj familioj iris ĉi tiun vojon. Post la Nakba de 1948 kaj 1967, homoj estis kaj daŭre estas forpelitaj de siaj hejmoj. Multaj homoj kunportas siajn loĝejo-ŝlosilojn kun la espero reveni hejmen. Kaj ĉi tiu espero estas transdonita de generacio al generacio. Mi scias, ke mia genealogia arbo estas forta kaj povas elteni ŝtormojn. Mi estas nutrata de la amo de miaj prapatroj. Sekvante ilian ekzemplon, mi povas porti aliajn en amo. Per ilia amo mi estas kiel verda folio sur la olivarbo. Kun la helpo de ilia amo, mi fariĝis forta kaj adaptebla.

*Ni kuraĝigu unu la alian: labori por paco, defendi ĉiujn virinojn, precipe tiujn, kiuj suferas subpremadon, perforton kaj marĝenigon, fidele pledi por paco kaj justeco en ĉiuj niveloj de la socio kaj de la eklezio*




EVANGELIO-LEGADO

**Leganto**
En la horoj antaŭ sia krucumo, Jesuo diris al siaj amataj disĉiploj:
„Mia ordono estas, ke vi amu unu la alian, kiel mi vin amis. Neniu havas pli grandan amon ol tio, ke iu demetas sian vivon por siaj amikoj. Mi ordonas al vi ami unu la alian." (Joh 15,12-13; 17)

RAKONTO DE LA FORTO

**1a gvidanto**
En la decida momento de sia vivo, Jesuo donis ĉi tiun ordonon al siaj disĉiploj:
Amu unu la alian. Tenu unu kun la alia en amo.

# La katedralo de Vác

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Episkopo Károly Eszterházy decidis konstrui la Katedralon de Nia Sinjorino de Vác en la 18a jarcento. Li serĉis taŭgan lokon por la katedralo de unu el la tiamaj plej grandaj diocezoj en la lando, kiun li volis konstrui laŭ la malfrua baroka gusto de sia tempo. Tiam la urbo Vác estis dividita al du partoj: al la hungara kaj al la germana kvartaloj.

Episkopo Eszterházy elektis la lokon de la preĝejo inter la du kvartaloj, tiel esprimante, ke li volas, ke la nova konstruaĵo servu ĉiujn loĝantojn de la urbo. La fundamenta ŝtono estis metita la 24an de majo 1762.

La preĝejo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estus modeligitaj laŭ la Placo de Sankta Petro en Romo.

La katedralo de Vác estas la unua klasikiganta malfru-barokstila katedralo de Hungario, dizajnita fare de la franca Isidor Canevale.

Origine la aŭstra konstruisto Pilgram dizajnis tradician duonrondan enirejon, sed la kostoj kaj la frua morto de la majstro faris ĝin malebla. Lia posteulo, Isidor Canevale, elpensis modernan, klasikisman eksteron en linio kun la nova arkitektura tendenco.

Poste oni konstruis multajn similajn konstruaĵojn, sed la fakto estas, ke meze de la 18a jarcento ĝi estis konsiderata tre noviga en nia lando. Konstruado komenciĝis en 1761, la preĝejo estis konsekrita en 1772, sed la interna laboro estis finita nur en 1777.

La katedralo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas la eklezia centro de la urbo. La Episkopa Palaco kontraŭ la ĉefpreĝejo daŭre estas la hejmo de la episkopo de la Diocezo de Vác.

Ĉirkaŭrigardante de la placo antaŭ la preĝejo, la emblemaj konstruaĵoj aspektas eĉ pli grandaj. La efiko estas okulfrapa kaj malĉasta sperto – rezulto de konscia planado, ĉar unu el la plej gravaj celoj estis, ke la nova katedralo superu la antaŭajn laŭ grandeco kaj aspekto, kaj reklami la potencon kaj riĉecon de la eklezio.



Inter la monumentoj elstaras ankaŭ la grandeco de la katedralo: ekstera longo: 72 m, interna longo: 60 m, alteco: 55 m. La kvara plej granda katedralo, kiu povas esti vizitata en Hungario, ĝia ĉefa fasado estas dominita per vestiblo kun ses korintaj kolonoj inter la turoj.

La interno de la preĝejo ĝojigas kun sia mirinda malfrubaroka stilo, la freskoj de la ĉefaltaro kaj la kupolo estas de la 18a jarcento, de Franz Anton Maulbertsch, la plej grava aŭstria pentristo, kaj temas pri la vizito de la Virgulino Maria al Sankta Elizabeto.

Tamen, episkopo Kristóf Migazzi ne trovis ĝin taŭga, kaj anstataŭigis ĝin du jarojn post ĝia kompletigo.

En 1994, post 170 jaroj, dum restaŭrado, estis trovita la originala bildo, kiun ni povas ankoraŭ hodiaŭ vidi.

Mi multe esperas, ke ĝis aŭgusto oni finos la grandan renovigadon, kiu estis komencita antaŭ jaroj kaj mi povos montri al la partoprenantoj de nia ĉijara kongreso tiun ĉi belegan katedralon.

Aliĝu kaj venu al la ĉijara renkontiĝo!





# Trinkakvo

## — subteno por Prokuroro en Bukavu, DR Kongo

Raporto kaj ĝisdatiga informo

Dr. Manfred WESTERMAYER, DE

Karaj gesamideanoj de IKUE kaj de KELI, unue denove tutkoran dankon al KELI en Germanio kiu forte subtenis la akvo-projekton de *Père Hubert*. Kaj ankaŭ al la prezentaĵo en Dia Regno en februaro 2023 (DR 2/2023).

En 2023 ni ricevis tre valoran komencan subtenon (10 %) de 4 gesamideanoj, kaj la plej grandan (82 % de 16 000 Euro) de la Ĉefa Diocezo de Freiburg im Breisgau / Germanio. 8 % estis la loka kontribuo. Ĉar Père Hubert devis ŝanĝi la unuan planon pro eksteraj kondiĉoj, la kostoj altiĝis, kaj ne eblis finkonstrui ĉion.

Sekve necesas plia – malgranda parto – kies kostoj estas 3 000 USD, por ke ankaŭ la 30 ekleziaj homoj povus havi la akvoprovizon ĉe la domoj de la paroĥo. Detalojn kaj fotojn vi trovos en la alkroĉita (apudpaĝa) raporto.

Mi ja scias ke ĉe KELI kaj IKUE laŭ iliaj statutoj tia subteno por tia konstrua projekto ne aperas en iliaj statutoj, ĉar ne estas rekta religia projekto kiel biblioj aŭ kantolibroj; sed aliflanke ĝi subtenas longtempe la sanon de la eklezianoj en la katolika paroĥo de Père Hubert.

Pro tio mi petas kaj KELI kaj IKUE informi siajn membrojn kaj peti ilin persone subteni – per eta kontribuo (po 20 Euro aŭ eble pli) kolekti tiujn 1 400 Eurojn. Civitano de EU-lando povas redukti sian imposto-pagon per tiu subteno, se ili donas sian adreson – aŭ dum la transpago, aŭ al mi. La detalojn vi vidas en la alkroĉita raporto.

Mi planas transpagi al Père Hubert komence de junio.

Anticipe mi kore dankas por viaj kontribuoj (en formo de distribuota teksto kaj/aŭ rekta subteno).

Bondezirojn, samideane kaj amike,

*Manfred WESTERMAYER*

**Adreso kaj bankkonto por subteno:**

Verein Direkthilfe für Kleinprojekte e.V.
Flaunserstr. 1,
DE-79102 Freiburg,
https://www.direkthilfe-freiburg.de/projekte/afrika/bukavu.html

Konto: Volksbank Freiburg,
IBAN: DE58 6809 0000 0009 4430 02,
BIC: GENODE61FR1

*Bonvolu noti krom via nomo kaj eble adreso, kiel celon de via donaco "Bukavu".*

**Projekt-Adreso de AVE** (eo):

Dr. Manfred Westermayer,
Weissdornweg 68,
DE-53177 Bonn,
<manfred@westermayer.de>;

Raportoj pri jamaj projektoj:
http://www.verduloj.org/afriko.htm

# Akvo por paroĥo de Père Hubert en Bukavu, Provinco Suda Kivu, D.R. Kongo

En julio 2022 ni ricevis peton de Père Hubert MUKUNGILWA, de la paroĥo Prokuroro Kasongo Muhumba (ProKaMu) en Bukavu kiun ni jam konis de la akvo-projekto en Kalima: La ŝtata firmao REGIDESO ne sukcesas provizi la homojn tie per purigita trinkakvo.

Kutime la homoj ĉerpas akvon el lagoj aŭ riveroj, tiel ofte okazas malsanoj. Por eviti malsanojn oni devus aŭ varmigi la akvon super 70 °C aŭ aĉeti de kamiono, ambaŭ kostas multe da mono, kaj la boligo per lignokarbo havas malbonan klimatan efikon.

Père Hubert havis la ideon preni la akvon de la granda lago, filtri kaj desinfekti ĝin por provizi ne nur siajn paroĥajn konstruaĵojn – tie loĝas ĉirkaŭ 30 homoj (seminario de teologoj, maljunulejo por pastroj, kaj 7 fratulinoj) – sed ankaŭ por la 1 500 homoj en la ĉirkaŭa kvartalo.


Li ricevis la formalajn akceptojn kaj de sia episkopo, Mgr. Placide LUBAMBA NDJIBU, kaj de la urbestro de tiu urboparto Bukavu-Ibanda, Dunia Rhuniga. Ambaŭ volonte akceptis tiun planon, por eviti tiujn oftajn malsanojn.


Li petis la esperantistan asocion AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj) organizi subtenon de 16 000 Euro. Ĉirkaŭ 10 % ni ricevis de KELI kaj de samideanoj, 8% venis de la loka paroĥo. Dank' al la asocio “Direkthilfe e.V. “ (Rekta Helpo), ni povis peti adician subtenon de la departemento “Weltkirche“ (do, Tutmonda Eklezio) de la Ĉefa Diocezo en Freiburg im Breisgau, Germanio. Dank' al ilia grandanima subteno Hubert povis jam realigi la plej grandan parton de ĉi-tiu projekto. Tio signifas ke la civitanoj en la ĉirkaŭaĵo jam havas aliron al la 2 kranaroj por plenigi siajn kanistrojn kun bonkvalita akvo en mallonga distanco al iliaj domoj.

Bedaŭrinde lia unua plano, preni la akvon el la lago okcidente, apud la paroĥo, la konstruo estis devigata preni la akvon el la orienta flanko de tiu duoninsulo (de la Baie de Nguba, vidu la foton de Google maps aŭ vizitu https://tinyurl.com/2sv38m7w). Tial necesis pli longa tubo, kaj pli altaj kostoj. Nun montris, por ke la akvotubo atingu ankaŭ la homojn de la paroĥaj domoj, necesas ankoraŭ ĉ. 3 000 USD (2 800 Euro).

Do, ni petas denove kaj duonon (1 400 Euro) de la “Weltkirche“ kaj duonon de niaj samideanoj por realigi ankaŭ la akvoprovizon por la paroĥaj domoj. Père Hubert organizas la projekton, kaj ili planas preni malaltan pagon por la akvo (ĉ. 5 US-cendoj por 20 litroj), por mem financi eventualajn estontajn riparojn.

**Bonvolu subteni la peton de Père Hubert – koran dankon !**




Bukavu-Ibanda: Google-maps: https://maps.app.goo.gl/
RF6ponaWw3ZPCQCy7
Akvoturo ĉe Avenuoj Genevieve/Muhumba,
tie ISP = Pedagogia Instituto
La paroĥaj domoj: PROKAMU (Prokurore de Kasongo)
supre maldekstre

| | |
|---|---|
|  Akvoturo kun filtrado kaj disinfektado |  2 Kranoj proksime de MONUSCO |

# Informetoj

## Grava korekto

Bedaurinde troviĝas eraro en la bankakontonumero ĉe la CIC-banko en la kotiztabelo en Dia Regno 6/2023. Ni petas pardonon.

La ĝusta numero de la bankkonto estas la jena:
IBAN: FR 76 1009 6182 4800 0368 7480 104

/Redaktoro

## Informe

Sekvontjare, 2025, la Universala kongreso de UEA, UK, okazos en Brno, Ĉeĥio, 19 – 27 de julio.

## Listo de aliĝintoj al la kristana kongreso en Vác.

Je la 26a marto

1. Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, Hungario
2. Bengt Olof ÅRADSSON, Svedio
3. André ÅRADSSON, Hungario
4. Pavel POLNICKÝ, Ĉeĥio
5. Vacláv POSPÍŠIL, Ĉeĥio
6. Philippe COUSSON, Francio
7. Pavol PETRIK, Slovakio
8. Petr CHRDLE, Ĉeĥio
9. Antal PESTI, Hungario
10. Marek DABROWSKI, Pollando
11. Zdeněk KADLEC, Ĉeĥio
12. Helena KLESOVÁ, Ĉeĥio
13. Oldřich Arnošt FISCHER, Ĉeĥio
14. Gabriella STIER, Rumanio
15. Judit OLÁH, Rumanio
16. Ruth van PUIJENBROEK, Svislando
17. Jiří STUDENÝ, Ĉeĥio
18. Pavla STUDENÁ, Ĉeĥio
19. Agneta JÄRLSTRÖM, Svedio
20. Margareta ANDERSSON, Svedio
21. Tibor KEPENCAY, Slovakio
22. Magnus SUNDMAN, Svedio
23. Sándor MONOSTORI, Aŭstralio/Hungario
24. Bohuslava PŘEVRÁTILOVÁ, Ĉeĥio
25. Antal FARKAS, Rumanio
26. Katalin POPOVICIU, Rumanio
27. Teresia SCURT, Rumanio
28. Mária LÁSZLÓ, Hungario
29. Paul-Henri LESPRIT, Francio

# Dio, mi pekis

(originale verkita en Esperanto)




3. Mi nur ĉasis brilantan strason,
pretervidis la diamanton.
Mi neglektis Vin, mian Dion,
mian propran bonon.

4. Vi deturnu min for de l' strato
al pere' min loganta.
Rekonduku min sur la padon
min gvidantan al vivo

DIO, MI PEKIS • M (kun la 4a psalmotono) kaj E:
Albrecht Kronenberger. 2020-04-11, la Sanktan Sabaton